

Zamenhof-festo en Freiburg
15-a de decembro 2012

Karaj geamikoj,
ni elkore invitas vin al la komuna Zamenhof-festo ĉi-jare en Freiburg.

Ni renkontiĝas denove ĉe Treffpunkt (13:45), tiam komune esploras iom la novan kvartalon Rieselfeld, poste kafumas kaj aŭdas prelegetojn. Post komuna vespermanĝo restos ĉiom da tempo por babilado.

Krom tiu kerna programo ni povas proponi al vi **“antaŭkongreso”**, se tio interesas vin. Ekzemple kun vizito de la Kristnaska Bazaro en la urbocentro poste tagmanĝo (ĉ. 10 €) en “Glaŝaus”, la komunuma centro de Rieselfeld (nova okcidenta kvartalo)

Komenco de la **“antaŭkongreso” je 10:30 horo en la Info-Point ene de la stacidomo.**

La programo

13:45 Renkontiĝo ĉe Treffpunkt (parkado eblas plurloke kaj tre proksime)

14:00 Komuna tramveturado kaj duonhora promenado en kvartalo Rieselfeld ĝis "Glaŝaus" je la Maria-Rudloff-Platz.

- gvidado tra ekumena preĝejo kun tre interesa arkitekturo
- promenado kaj reveturado al Treffpunkt. (Se la vetero malbonas, ni promenas nur mallonge)

16-a Kafo kaj kuko - Poste Prelegetoj pri

- Rieselfeld (Attila)
- Mazingira (Manfred)
- 125 jarojn da Esperanto en bildoj (Ursula)

18-a aŭ poste

vespermanĝo * laŭ la ĉina

Por kafo kaj vespermanĝo ni petas kontribuon de 10 €.

Aparte por povi plani la manĝojn ni petas vian aliĝon

Se vi havas iun demandon, ne hezitu kontakti nin! Ni antaŭĝojas vian venon!

Esperanto Freiburg

Ursula Niesert

Renkontejo por la „aŭtistoj“: 13:45 ĉe Treffpunkt

Se vi alvenos per aŭto, vi bezonas taŭgan parkejon dumtage. Ĉar dum la tuta tago ni moviĝos per tramo/busoj (ĉefe al kvartalo Rieselfeld kaj reen, bileto por ĝis 5 personoj kostas 9,50 €). Ni proponas la parklokojn ĉe Treffpunkt, ĉar tie ili estas senkostaj kaj abundas. - Do por ĉiuj, kiuj alvenos per aŭto ni proponas „aŭtistan renkonton ĉe Treffpunkt“, Ursula atentos vin tie (ankaŭ eblas iri al la necesejo tie :-). Ŝi aĉetos kun vi la bezonatajn biletojn kaj komune veturos al la renkontejo en Rieselfeld.

Pri la malfacileco trovi Treffpunkt e.V., Schwarzwaldstraße 78 D, Freiburg im Breisgau

Ĉar ĝi situas en la malantaŭa flanko de la domo, ĝi estas sufiĉe kaŝita.

Se vi havas problemojn trovi ĝin, mi volonte sendas apartan mapon.

La koordinatoj de Treffpunkt estas: Vidu aldonitan mapon

• Trovi ĝin estas tute facile, se vi venas per tramo:

el la urbocentro, atingi la haltejon „Zentrum Oberwiehre“ per tramlinio 1 (direkto LITTENWEILER). Pluiru laŭ la tuta longo de la konstruaĵo Sĉwarzwaldstraße 78. La lasta enirejo de la strato estas „C“. Ĉirkaŭiru ankaŭ la enveturejon al la parkkolo, kaj tiam turniĝu dekstren, post 50 m denove dekstren al la malantaŭa angulo de la domo kaj jen vi atingis vian celon: enirejo D, Treffpunkt Freiburg.

Rimarko: iom pli for maldekstre estas UB1 (provizora Universitätsbibliothek).

• Pli komplikiĝas per aŭto:

Se vi havas navigilon (aŭ uzas la mapojn [maps.google](https://www.google.com/maps)), NE entajpu kiel adreson Sĉwarzwaldstraße 78 D, SED la adreson: Schützenallee 45 !!! aŭ la koordinatojn: **47,986453 - 7,870**

Tiam la navigilo (espereble) direktas vin ĝuste al trankvila strato en loĝkvartalo, kie vi facile trovas parklokon. Eniru Frajburgon de la aŭtoŝosea elirejo „Freiburg-Mitte“, kaj veturu ĉiam rekten (direkto Donauesĉingen), sed LAŬEBLE vi NE eniru TUNELON !!!

Kalkulu la semaforojn+pontojn : Ĉe la tria ponto vi ne plu preterpasas la riveron. Nun estas tramreloj maldekstre. Tiam vi bone atentu pri bierfarejo Ganter maldekstre: nun elektu la **maldekstran** trakon kaj ĉiam restu apud la tramreloj, do NE eniru la tunelon, sed deflankiĝu maldekstren por eviti ĝin. Tuj poste, antaŭ Sell-benzinejo iru dekstren kaj tuj poste maldekstren: Schützenallee. Je la fino de la domoj, serĉu parklokon. la koordinatojn: : **47,986453 - 7,870**

Pluiru ĝis la lasta moderna domo (en la maldekstra flanko) kaj prenu la vojeton por piedirantoj inter tiu domo kaj la ludejo. Preteriru la tri loĝdomojn kaj jam vi vidas Treffpunkt maldekstre antaŭ vi.
Rimarko: iom pli for dekstre estas UB1 (provizora Universitätsbibliothek).

Bonvolu sendi la aliĝilon al
Esperanto <uniesert@gmx.net> kaj al <manfred@westermayer.de>

Aliĝilo por la Zamenhof-festo en Freiburg, 15-a de decembro 2012

Nomo

adreso

telefono.....

retadreso

Mi venos ...

sola kun _____ klubanoj

Mi / ni venos ...

aŭte Mi bezonas la koordinatojn por la navigilo

trajne/buse

Mi / ni partoprenos ...

ankaŭ la "antaŭkongreson"
kaj mendas manĝon (10 €) en Glaŝaus

nur la posttagmezan programon

Mi / ni ŝatus manĝi ...

vegetare

ne-vegetare

Mi / ni proponas prelegeton

pri

Alveno de Colmar pere de publika transporto:

Colmar Gare Bus 08:57

Colmar Théâtre (Trace 21, Quai G) 09:05

Colmar Bonnes Gens 09:13

Horbours Place du 1er février 09:17

Andolsheim Centre 09:22

Neuf Brisach Syndicat d'Initiative 09:35

Volgelsheim Caserne 09:38

Volgelsheim Mairie 09:42

Pont du Rhin 09:44

Breisach Bahnhof Bus an 09:48

Breisach Bahnhof Zug ab 09:55

Freiburg HBF Zug (BSB) an 10:21

